

Tre ofte, kiam mi vidas sciuron sur la vojo, ĝi ĉesas moviĝi dum mi alproksimiĝas al ĝi. Mi stiras por veturi eble unu metron for de ĝi (se ĝi sidas en la mezo de mia trako de la vojo, mi ne disponas pri pli ol unu metro flanke de ĝi). Sed, preskaŭ ĉiam, kiam mi estas tuj preterpasonta ĝin, la sciuro subite ekkuras – kaj pli ofte ol ne, ĝi ekkuras en la direkto de mia vojo!!!! Rekte antaŭ mia biciklo!! Ĉu tio montras inteligentecon?

Mi estas aparte sentema pri tio, ne nur pro la memoro pri dekoj da platigitaj sciuroj sur la vojo, sed ankaŭ ĉar efektive mi pretervole jam surveturis la voston de sciuro kiu klopodis kuri trans biciklo-vojeton (en parko) inter miaj biciklo-radoj, ne plene sukcese. Mi sentis la malkavaĵon kiam mi ĝin surveturis, sed ĉar temis pri tre eta malkavaĵo, kaj ĉar la sciuro daŭrigis sian kuradon poste, mi konkludas ke nur la voston mi trafis. Tamen, tio lasis al mi profundan impreson, kaj timon iam mortigi tiujn „ja stultajn!” bestetojn!

Eble ne temas ĝuste pri stulteco, eble temas pli pri troa bravado, troa emo ludi, sin provi vivriske, io simila al la homa emo skii, veturi per rul-tabulo, ski-tabulo, ktp en pli kaj pli danĝeraj lokoj. Sed mi mem ne plu havas tian emon – nek rilate al mia propra vivo, nek al tiu de la sciuroj. Do, ĉarma, eble eĉ inteligenta sciuro, mi petas, bonvolu ne plu fari vian bravprovan ludon kun mi. Bonvolu ne morti sub mia biciklo-rado, kaj ne plu ŝajnigi al mi, ke vi tion faros.

— Joel Brozovsky
Oficeja Direktoro de Esperanto-
Ligo por Norda Ameriko

Mi ege ŝatas la eseeton de Steĉjo, "Inteligenteco."

— Olga du Temple

DEFIO PRI TRADUKADO (Gene tradukis poemeton de Ogden Nash pri Muŝoj.)

Estimata Redaktoro,

Mi skribas pri la artikolo fare de Gene Keyes en la aŭgusta numero de *Inter Ni*. Unue, mi konfesu, ke mi scias malmulton pri traduko de poezio kaj nenion pri traduko de kantoj. Tamen, la ekzemplo traktis poemon, kaj mi tial kuraĝas iom diri pri tradukado de poemoj, agnoskante ke pluraj el niaj legantoj pli kompetentas ol mi tion fari.

Mi opinias, ke kiam oni tradukas poemon, la unua postulo estas ke oni iel transdonu la signifon el unu lingvo kaj en alian. Ritmo ja gravas en poezio, sed lingvoj malsamas, kaj ritmo natura al la fontlingvo ne ĉiam taŭgas por la cellingvo. Kaj mi ne konsentas, ke la nombro de silaboj devas esti identa en la originalo kaj en la tradukaĵo. Laŭ mia kompreno, por longaj tradukoj eĉ Zamenhof pligrandigis la nombron de silaboj kaj elektis alternativan ritmon. Rimo estas dezirinda, sed mi rimarkas ke poetoj ofte efike uzas aliajn sonfigurojn (aliteracio, asonanco, ktp) por krei belajn versojn. Tamen, la ĉefa afero estas la signifo, kaj oni povas transdoni tion multmaniere.

Jen la originalo kaj kelkaj tradukproponoj kiuj pli-malpli plenigas la severajn limigojn de Gene:

THE FLY

God in his wisdom made the fly
And then forgot to tell us why.

„Estu nun muŝo”, diris Di’;
Kialon kaŝis Di’ de ni.

„Estu nun muŝo!” Vort’ de Di’,
Klarigon donis ne al ni.

Muŝon tre saĝe kreis Di’;
Kialon ne alrajtas ni.

„Estu la muŝo!”, kaj jen vid’,
sed Dio agis sen klarig’.

„Muŝo estiĝu!”, jen la fi’;
Klarigomankaj restas ni.

Dio estigis muŝon, ve!
Dividis la kialon ne.

„Muŝo estiĝu!” – estis best’,
Sed mankis kial’ , ĉu forges’?

„Muŝo estiĝu!” – Bona Di’
forgesis nin klarigi pri.

Di’ ekparolis: „Estu muŝ’!”,
Neceso ne el Lia buŝ’.

Dio ordonis: „Estu muŝ’!”,
Kialo ne el Dia buŝ’.

Muŝon tre saĝe kreis Di’;
Por kio? – tutsilentis Li

„Estu sur tero muŝinsekt’!”,
— Nekomprenebla Di-projekt’.

„Muŝo estiĝu!”, jen la fi’;
Utila Die, ne al ni.

„Muŝo ekzistu!” – kaj jen ĝi,
Al Di’ amata, ne al ni.

Muŝo ekzistu!”, tondris Di’;
Sed kial? – nur silentis Li.

„Muŝo nun estu!”, fulmis Di’;
Por kio? Ne eldiris Li.

„Muŝo ekzistu!” – bona vid’,
Forgesis Dio pri klarig’.

Dio sagacis, jen la muŝ’,
Sed kial’ ne el Dia buŝ’.

„Muŝo estiĝu!”. Di’ Jehov’
eksplikis ne pri Sia prov’.

„Muŝo ekzistu!”. Sed Jehov’
klarigis ne pri Dia prov’.

„Muŝo ekestu!”. Eternul’
kialon lasis en nebul’.

„Muŝoj ekzistu!” Jen la par’.
Klarigo mankas pri la far’.

Muŝoj ekzistas: Dia saĝ’.
Bedaŭre nur al ni domaĝ’.

Iĝis la muŝ’ pro Dia sci’.
Kialon ne malkovris ni.

Estas la muŝ’ pro Dia sci’.
Kialon ne malkaŝis Li.

Dio ordonis: „Muŝ’ sur ter’!”,
Kialo restas ja mister’.

Finante mi diru, ke Dio ja agis saĝe, kaj kreo de muŝoj absolute ne estis fuŝa afero. En la naturo muŝoj estas tre utilaj estuloj, eble pli utilaj ol la homaro. — Steĉjo Norvell

IU NE RIMARKINDA SEPTEMBRA TAGO (La dek unuan de septembro falis homo iale mortita,...)

Mi kelkfoje tralegis la poemon "Iu ne rimarkinda septembra tago" kaj mi opinias, ke mi komprenas, ke temas pri tago, kiam Salvador Allende estis mortigita. Rilate al la lingvo de la poemo: aŭ ĝi estas tiom altgrada, ke mia lingvoscio ne sufiĉas por kompreni ĝin, aŭ ĝi estas plena de misformitaj vortoj kaj mi ne kapablas deĉifri ĝin. Laŭ mia opinio la aŭtoro estas novbakita esperantisto, kiu emas esprimi sin tro komplike.

— Olga du Temple

Mi konsentas, ke “poemo” en la septembra numero gravas pro la enhavo. Jen pensoj, al kiuj mi identiĝas.

— Eli Urbanova

NENIE - ĈIE (Ĉu la videbla kaj sentebla lando iĝos malpli kaj malpli reala? Kaj la nevidebla komunoj de pensoj kiel Esperantio iĝos pli kaj pli realaj?)

Plaĉas al mi konjekto de Reni Porter: Ju pli boniĝas la elektronika komunikado, des pli realiĝas niaj mensaj landoj.

— Eli Urbanova

La artikoleto de Reni Porter estas aparte pens-instiga. Mi tamen ne limigus la konkludon al tiu konjekto donita de Reni ĉe la fino; estas multe pli da pensoj komencitaj tie!

— Joel Brozovsky

RUANDO POST DEK JAROJ (Oni ne plu povas nur paroli pri tiaj aferoj, oni saĝe devas agi.)

Permesu, ke mi reagu je la sekvanta artikolo pri Ruando Post Dek Jaroj de Via redaktoro kaj samtempe je la vere sprita Inteligenteco de Steĉjo en la aŭgusta numero per citaĵo el mia recenzo pri la libro de Eugéno de Zilah «Kaj kiu pravas» presita en "La Gazeto" en la jaro 2003:

Viro kaj virino. Estaĵoj tiel similaj kaj tamen tiel diferencaj. Laŭ miaj longjaraj spertoj fonditaj sur la eblo de senpera komparo, viroj nin virinojn spirite superas. Ho jes, ekzistas feminoj, kies escepta inteligenteco al la vira preskaŭ egalas, sed tiajn kalkuli sur fingroj de unu mano. Al viroj mi riproĉas jenon: ke ili ne kapablas certigi pacon sur ĉi tiu planedo.

— Eli Urbanova

ĈI SEPTEMBRA LIBRO-FOIRO EN HALIFAKSO

Dum mez-septembra dimanĉo en halifaksa kajo-konstruaĵo, oni refoje celebris librojn dum la ĉiujara libro-foiro nomita "Vortoj je la stratoj". Oni vendis kaj aĉetis librojn, laŭtleĝis el libroj, kaj parolis pri libroj. Refoje la loka esperantistaro plenigis tablon kun libroj, broŝuroj, gazetoj kaj aliaj informiloj en kaj pri la internacia lingvo. Ni alparolis multajn preterpasantojn pri la internacia lingvo, kaj kelkaj el ili ŝajnis veran interesiĝon pri la afero. Kelkaj parolis pri siaj propraj spertoj pri Esperanto, dum aliaj diskutis la anglan kiel la veran internacian lingvon de la nuntempa mondo. Kelkaj eĉ surpriziĝis, ke Esperanto (ankoraŭ aŭ eĉ) ekzistas. Aliaj memoris nin de pasintaj jaroj. Iom post iom ni enkondukadas nian aferon en la konscion de la halifaksa libro-ŝatantaro.

— Bob Williamson